



# Esperanto-kastelo Greziljono

*Kulturdomo de Esperanto,  
Grésillon,  
49150 Baugé en Anjou,  
Francio*

*<kastelo@gresillon.org>*

En la Luar-valo, fama pro siaj multnombraj kasteloj, viaj paŝoj gvidos vin al la Kulturdomo de Esperanto, Greziljono. La urbeto *Baugé* kaj dekkvino da apudaj urbetoj konsistigas la komunumon, kie troviĝas la kastelo: *Baugé en Anjou*, kun 12 000 enloĝantoj. Tie videblas ankaŭ dumiljara dolmeno, spiralaj sonorilturoj, fama apoteko, kiu datiĝas de 1675, kaj peco de la "vera kruco de Kristo" alportita en 1244. Tiu ĉi iĝis la Lorena kruco, emblemo de la liberigita Francio depost la dua mondmilito. La nepo de Zamenhof partoprenis la konstruadon de monumenta Lorena kruco omaĝe al *Charles de Gaulle*, en la lorena urbeto kie situis ties ripozdomo.

En 1421, francoj kaj skotoj venkis anglojn en *Baugé*. En la sama jarcento, la reĝo *René d'Anjou*, Renato de Anĵuo, konstruigis la kastelon de *Baugé*.



En 1951, *Henri Micard*, serĉanta konstantan ejon por ĉiujaraj someraj Esperanto-lernejoj, ekvizitis la kastelon Greziljono... kaj malpli ol tri monatojn poste, finaĉetis ĝin, per la mono de tricento da Esperantistoj grupiĝintaj kiel kooperativa societo. Ĝi rapide fariĝis unu el la ĉefaj centroj de Esperanto-instruado: multaj Panteonanoj instruis tie.



Nuntempe, ĉiujare Greziljono organizas staĝojn kun kursoj, ekzamenoj, prelegoj, spektakloj kaj distraj vesperoj, diversaj aktivaĵoj: kantoj, joko, bindado, ktp... Vi estas bonvena, kaj vi povos krome ekskursi aŭ bicikli sur novkreita verda vojo, kaj eĉ praktiki la lokan sporton per nesfera ĵetpilko: *boule de fort*. Krom sia esperanta programo, la kastelo estas

ludonata al privatuloj, ekzemple por familiaj festoj, artistaj aranĝoj... Ankaŭ vi aŭ via asocio povas lupreni ĝin por viaj renkontiĝoj!



Parto de la kastelo datiĝas de la 17a jarcento, sed pli granda parto de 1882. Dank'al la laboro de volontuloj kaj profesiuloj, la kastelo kaj ĝia parko estas konstante prizorgataj kaj renovigataj. Tute nova tegmento kovras tutan kromdomon, nova ĉambro alirebla per rulseĝo estas konstruata, kaj pliaj plibonigoj atendetas... Ĉiujn informojn pri la maniero helpi aŭ simple viziti Greziljonon vi trovos en nia retejo: **gresillon.org**.